

William Blake,
The Tyger

Tyger Tyger, burning bright,
In the forests of the night;
What immortal hand or eye,
Could frame thy fearful symmetry?

In what distant deeps or skies
Burnt the fire of thine eyes?
On what wings dare he aspire?
What the hand, dare sieze the fire?

And what shoulder and what art,
Could twist the sinews of thy heart?
And when thy heart began to beat,
What dread hand? and what dread feet?

What the hammer? What the chain,
In what furnace was thy brain?
What the anvil? What dread grasp,
Dare its deadly terrors clasp!

When the stars threw down their spears
And water'd heaven with their tears:
Did he smile his work to see?
Did he who made the Lamb make thee?

Tyger Tyger, burning bright,
In the forests of the night;
What immortal hand or eye,
Dare frame thy fearful symmetry?

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas WILLIAM BLAKE (*1757-11-28 – †1827-08-12).*

Arg-1048-2125 (2014-06-08 19:43:08)

Pri la poeto vidi la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/William_Blake.

William Blake,
La tigro

tradukita de William Auld

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝis kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo
Ardis via okulhelo?
Kia lin flugil' subtenis?
Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno.
Por vi tordiĝis kortendeno?
Kaj kiam pulsas batoj koraj,
Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?
Kia forn' por cerbo via?
Riskis kia fort' kolosa
Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis
Kaj sur la ĉielon larmis,
Ĉu la verko al li karis?
Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝus kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger" de WILLIAM BLAKE (*1757-11-28 – †1827-08-12) en Esperanton de WILLIAM AULD (*1924-11-06 – †2006-09-11).*

Arg-1048-2127 (2014-06-08 19:35:19)

Tiun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/tigro.html>.